

Usona Esperantisto № 2018:4 (jul-aŭg)

Anoncoj

Forpasis Matthew CHISHOLM ; Do you blog in (or about) Esperanto? ; Radioamatoroj serĉataj

We're moving! / Ni translokiĝas!

anoncoj • Filipino DORCAS

We are moving the Central Office of Esperanto-USA from California to Maine.

New Tools for Communication

de la prezidanto • Filipino DORCAS

To improve our relations with our members, the Board of Directors is launching a new series of webinars and AMA sessions.

De la estraro

Raportoj de la Direktoroj kaj aliaj estraranoj.

Rapide kreskas nia retarĥivo

de la redaktoro • Hoss FIROOZANIA

Ĝi nun enhavas skanaĵojn de preskaŭ ĉiu numero ekde 1959 – entute pli ol 300 novajn PDF-dosierojn.

First experiences at NASK

loke • Sandra BIRD

Duolingo provided a reasonable introduction to Esperanto, but I was starting to feel stuck and decided to sign up for NASK.

Dr. William Sol Benson, America's Original Esperantist (part 2)

historie • Kristy LOMMEN

Dr. Benson was one of the earliest and arguably most influential of Esperanto's advocates in America.

Leo Wiener: The First Proto-Esperantist in America

el la arĥivo • Bernard GOLDEN

He was not an Esperantist but a *proto*-Esperantist, who came to America before Esperanto was made public in 1887.

NASK kaj LK: unua plongo en du grandajn eventojn

loke • Marcus GRIEP

La Nord-Amerika Somera Kursaro ĉe Raleigh kaj la Landa Kongreso ĉe Seatlo allogis grandajn kvantojn da partoprenantoj por realigi Esperantujojn dum iom da tempo.

Malsata stomako orelon ne havas

enigmo-solvoj

La solvo de nia pasintnumera enigmo.

La timanta riĉulo

enigmoj • Daĉjo RUTAN

Profesoro Ŝibolet tuj ekstaris kaj kaptis la brakon de la nova servistino antaŭ ol ŝi povis forkuri. "Voku la policon!"

Acha

senintenca esperantaĵo • Zerbie HYNSON

Ĉu glaciĥokeo vere kaŭzas tiel malagrablan impreson?



La Perdita Generacio ludas ĉe la Landa Kongreso en Seatlo.
Foto danke al Marcus GRIEP.

Anoncoj

Forpasis Matthew CHISHOLM

Je la 1-a de Aŭgusto mortis Matthew CHISHOLM, konata de multaj usonanoj. Li servis kiel prezidanto de Esperanto-Toronto dum pluraj periodoj, la unua en 1999 kiam li fariĝis la plej juna prezidanto en la historio de la klubo. Kiel junulo li partoprenis dufoje en aŭtunaj renkontiĝoj en Ludlow, Vermont, tiam nomataj *Okemo*. En 1999 li partoprenis en la usona landa kongreso en Sankta Luiso kaj ankaŭ iam renkontis okcidentajn usonanojn ĉe NOREK. Sed la plej oftaj renkontoj kun usonanoj estis ĉe MEKARO (Mez-Kanada Renkontiĝo) kiu ĉiam okazas en Majo en ĉefaj urboj de Ontario kaj Kebekio.



Mateo estis jam lingvemulo en juna aĝo. Li estis membro de infana ĥoro kie li lernis la perfektan prononcadon de la germana por kanti la lidociklon *Die schöne Müllerin* (“la bela muelistino”) de Franz SCHUBERT. Li frekventis dulingvan lernejon, kiun li nomis la “franc-entropa lernejo”, laŭvorta traduko de la angla *French immersion*. Li ĉiam havis fortan intereson pri la gaela lingvo, kiun li bone parolis kaj studis ĝis lastatempe, estante estrarano de la Gaela Societo de Toronto.

Mateo laboris por la registaro de Ontario en la ministerio pri la medio, kie li plenumis la oficon de dulingva prijuĝisto de permesilpetoj, kaj ankaŭ estis komisiito de la sindikato. Liaj kolegoj priskribis lin kiel fonton de informo kaj laŭdis lian entuziasmon kaj kapablon kiel instruisto. Lastatempe li organizis franclingvan klubon en sia oficejo por helpi kolegojn ekzerci sin en tiu bezonata laborlingvo. Li mankos al ni ĉiuj.

— Detlef KARTHAUS, Toronto

Do you occasionally blog in (or about) Esperanto?

If you’ve looked at our home page recently, you’ve

probably noticed the links to members’ recent blog posts around the web. This is a service available to all members, no matter where their blogs are hosted.



Every morning we check our list of blogs and add links on the E-USA website to any new posts that the authors have tagged for redistribution. The use of tags makes it possible for bloggers to share only what they want to share — a blog might be geared toward general interest topics, for example, with only the occasional post related to Esperanto. That’s why we link only to posts that are explicitly tagged for republication on our website.

Want to have your blog posts featured on our site? Here’s how:

1. Send us a message at webmaster@esperanto-usa.org with your blog’s URL.
2. Use your blog as you always have. Whenever you post something that you’d like us to feature, just tag the post with **EsperantoUSA**. (In some blogging software, tags are also known as *labels* or *categories*.) If your blog doesn’t support tags, you can also include **#EsperantoUSA** anywhere in the text of a post.

That’s it! Once we’ve started following your blog, links to new entries should appear on our home page no later than a day after you post them.

And if you *don’t* have a blog yet, why not start one?

It’s easy! Have a look at the free blogging sites **Blogger** <<https://blogger.com>>, **Medium** <<https://medium.com>>, and **WordPress** <<https://wordpress.com/start>>. Each makes it possible to start a blog in a matter of minutes.

Radio-amatoroj serĉataj

Mi estas 82-jaraĝa radioamatoro en Davenport, Florido. Eble vi aŭdis pri uzado de Esperanto en amatora radio. Kiam estas bona propagado de radio-

ondoĵ, esperantistaj radio-amatoroj renkontiĝadas en etero por praktiki la lingvon.

Laborinte en Usono ekde 1999, mi aĉetis kelkajn bonegajn ricev-sendilojn. Nun mi loĝas en privata ruldomejo kiu ne permesas radioamatorajn antenojn.



Mia ideo estas donaci al E-USA unu 100-vatan radioaparaton kun necesaj akcesoraĵoj kaj dupolusaj antenoj. Mi pensas, ke estus prestiĝe por la asocio havi funkciantan radio-stacion. Se inter la membroj estas radio-amatoro, kiu volos esti estro de tia radiostacio, bonvolu kontakti min ĉe n3gd@mail.ru.

— Leonid TURKADZE, N3GD

Rapide kreskas nia retarĥivo

de la redaktoro • HOSS FIROOZANIA

Pasintnumere mi anoncis projekton ciferigi malnovajn numerojn de la bulteno por nia retarĥivo. Mi ĝojas raporti, ke la laboro rapide progresas.

Hodiaŭ (ekde la 31-a de Aŭgusto) la arĥivo nun enhavas skanaĵojn de preskaŭ ĉiu numero ekde la jaro 1959 – entute pli ol 300 novajn PDF-dosierojn. Mi esperas finfine atingi la unuan numeron (N^o 1953:1) iam en malfrua Septembro.

Cetere, flanke de ĉiu PDF-dosiero haveblas por estontaj provlegantoj ankaŭ kruda tekst-dosiero farita per signorekona (angle, *Optical Character Recognition*) programo. Post kiam teksto de artikolo estas zorge provlegita, mi povos fari el ĝi retpaĝon en hiperteksta marklingvo (HTML). Unu el tiuj provlegitaj tekstoj aperas ĉi-numere sub nova rubriko *el la arĥivo*.

Kelkaj legantoj jam respondis al mia peto por provlegantoj (dankon!) sed novaj helpantoj estas ĉiam bonvenaj. Se vi emas provlegi malnovajn tekstojn, bonvolu vidi la **novan instrukcion (anglalingvan) en nia reta kolofono**

<<https://bit.ly/2CkYYuW>>.



In our last issue I announced a project to digitize back issues of the newsletter for our online archive.

I'm happy to report that the work is progressing quickly.

Today (as of August 31st), the archive now contains scans for almost every issue since 1959 – more than 300 new PDF files in all. I'm hoping to finally get to the very first issue (N^o 1953:1) sometime in late September.

In addition, alongside each PDF file there's a rough OCR-generated text file for eventual proofreaders. After the text of an article is carefully proofed, I can make a web page from it in HTML. One of those proofread texts appears in this issue, in the new column *el la arĥivo*.

Several readers have already responded to my call for proofreaders (thank you!) but new help is always welcome. If you feel like proofreading old texts, please see the **new instructions in our online colophon** <<https://bit.ly/2CkYYuW>>.



HOSS FIROOZANIA

Hoss redaktas la bultenon en sia hejmurbo de Roĉestro, Novjorkio. Liaj vortoj ne reprezentas la vidpunktojn de E-USA aŭ ties estraro; pri siaj opinioj kulpas nur li mem!

hoss@lodestone.org

We're moving! / Ni translokiĝas!

anoncoj • Filipino DORCAS

We are moving the Central Office of Esperanto-USA from California to Maine.

This move was announced at our *Landa Kongreso* in Seattle in July, reflecting the news in our annual report (*Jarraporto*). The move will hopefully be completed in November. The Director of the Central Office, Vilĉjo Harris, has been instrumental in working closely with the board of Esperanto-USA to make these cost-saving plans and put them into action.



The expensive office spaces that we have been renting in the San Francisco Bay Area have been used due to the demand for Esperanto books and materials. In the early years of ELNA (The Esperanto League for North America) William and Cathy Schulze operated the book service out of their garage. As the popularity of Esperanto increased, it became evident that an office space was needed to house the stock of books. This was before the days of Amazon, EBay, and other online sources.

Esperanto speakers and learners are today more likely to search for books at Amazon. Esperanto-USA is now using Amazon fulfillment for most book sales. There are now many Esperanto products on Amazon which were previously taking up space and being sold at our Central Office. Now that we have much less of a demand for storage in the Central Office, we can move the office to the home of our Director, Vilĉjo Harris. This move will save us about \$30,000 per year, which is about the same as the annual deficit we have been running in the past.

There are also extra books that we would like to sell quickly from the Central Office. These are available at the bargain price of only \$3.00. These are books that are not part of our normal stock that have been in our inventory for years. Help us out by getting some gems from **this treasure bin** <<https://goo.gl/mKvaVw>>.

Note that there may be some short periods of time when the bookstore will not accept orders while we

are moving the office, so have patience for us while we move.

We expect the Central Office to be open again as usual in December, providing the same great services as before. If you have any questions or issues, please contact the Central Office or the Board of Directors. Thank you very much.



Ni translokas la Centran Oficejon de Esperanto-USA de Kalifornio al Majno.

Ĉi tiun translokiĝon ni anoncis ĉe nia Landa Kongreso en Seatlo en Julio, refero la novaĵojn en nia Jarraporto. La translokiĝo espereble finiĝos en Novembro. La direktoro de la Centra Oficejo, Vilĉjo HARRIS, rolis tre efike laborante kunlabore kun la estraro de Esperanto-USA por fari ĉi tiujn planojn de monŝparado kaj progreso ekagante.

La multekostaj oficejoj, kiujn ni luis en la Gofa Regiono de Sanfrancisko estis uzataj pro la furora bezono de Esperantaj libroj kaj materialoj. En la fruaj jaroj de ELNA (La Esperanto-Ligo por Nordameriko) William kaj Cathy SCHULZE funkciigis la libro-servon el sia hejma aŭtomobilejo. Ĉar la populareco de Esperanto pliiĝis, fariĝis evidente, ke vera oficejo estis necesa por stoki la librojn. Ĉi tio estis antaŭ la tagoj de Amazon, EBay, kaj aliaj interretaj fontoj.

Hodiaŭ esperantistoj pli probable serĉas librojn ĉe Amazon. Esperanto-USA nun uzas la servon de Amazon por vendi la plej kutimajn librojn. Nun ekzistas multaj Esperantaj varoj en Amazon, kiuj antaŭe okupis spacon en nia Centra Oficejo. Nun, pro tio, ke ni ne plu bezonas la grandan spacon por librostokado en la Centra Oficejo, ni povas transloki la oficejon al la hejmo de nia Direktoro Vilĉjo HARRIS en Majno. Ĉi tiu translokiĝo konservos proksimume \$30,000 jare, kio similas al la jara deficito, kiun ni spertis en la pasinteco.

Ekzistas ankaŭ kromaj, ekstraj libroj, kiujn ni volas vendi tuj de la Centra Oficejo. Ĉi tiuj estas haveblaj je la prezo de nur \$3.00. Ĉi tiuj estas libroj, kiuj ne estas

parto de nia normala stoko, kiuj estis en nia inventaro dum jaroj. Helpu nin, ricevante iujn juvelojn el **tiu trezorejo** <<https://goo.gl/mKvaVw>>.

Rimarku, ke dum mallongaj tempoj la librejo ne akceptos mendojn dum ni translokos la oficejon, do havu paciencon en la venontaj monatoj.

Laŭ planoj, la Centra Oficejo estos havebla denove kiel kutime en Decembro, havigante la samajn grandajn servojn kiel antaŭe. Se vi havas demandojn

aŭ problemojn, kontaktu la Centran Oficejon aŭ la Estraron. Multan dankon!



Filipo DORCAS

Filipo estas prezidanto de Esperanto-USA. Li kaj lia edzino Elizabeto loĝas en Fort Worth, Teksaso.

filipo@grupoj.org

Malsata stomako orelon ne havas

enigmo-solvoj

Malsata stomako orelon ne havas estis la proverba titolo de nia pasintnumera enigmo. En ĝi, profesoro Elija ŜIBOLET tede priskribis kazon al sia malsata (kaj ne aparte interesita) akompananto, Viola MIOZOTO, dum ili kune atendis manĝon ĉe restoracio.



La kazo temis pri la morto de Adam RIGIDEG, trovita sur parkobenko kun kuglo en la maldekstra tempio, gipsobandaĝo ĉirkaŭ la dekstra brako, kaj pistolo en la maldekstra mano. Unuavide ŝajnis, ke li mem mortigis sin. Sed Ŝibolet suspektis, ke oni efektive murdis lin en lia banĉambro, vestis la kadavron, kaj portis ĝin al la parko.

Ŝibolet trovis en la dekstra pantalona poŝo de Rigideg kvin monbiletojn kaj kelkajn monerojn; en la maldekstra, naztukon kaj cigaredan fajrilon. Kaj biletujon li trovis en poŝo ĉe la maldekstra kokso. Ŝibolet tiel eksciis, ke la murdinto eraris. Sed kiel?

Ne surprize, la plej frua solvo venis de nia fulmrapida detektivo Rafa NOGUERAS:

Rigideg havis monerojn kaj monbiletojn en la dekstra poŝo de sia pantolono, kvankam li havis gipsobandaĝon en la dekstra brako de jam kvar semajnoj. Homo, kiu havas gipsobandaĝon en la dekstra brako, ne uzus sian dekstran poŝon, sed la maldekstran (kaj li certe ne havus sian biletujon en la poŝo ĉe la maldekstra kokso, kaj disajn monbiletojn en la dekstra poŝo!)

Prave. Pro la gipsobandaĝo li verŝajne ne povus uzi la dekstrajn poŝojn. Se li mem fakte estus vestinta sin, lia dekstra poŝo plej verŝajne estus malplena: ĝi ne enhavus ĉiutagajn aferojn kiel monon.

Nia detektivo Erik FELKER rimarkis ankaŭ suspektindajn mankojn en la rakonto:

Kelkaj enigmeroj ŝajnis al mi maltrankviligaj. Profesoro Ŝibolet malkovris la identecon kaj adreson de s-ro Rigideg per manieroj tute ne klarigitaj de li. Simila estis la neklarigo de la identeco de la kuracisto de Rigideg, kiu devis certigi, kiam Rigideg ekuzis sian gipsobandaĝon.

Hmm ...

Kiam mi konsideras la neklarigitajn pruverojn de la Rigideg-afero malgraŭ la ĝenerala troparolado kaj pavumado de Ŝibolet, mi konkludas ke Ŝibolet certe sciis, kiu estas la murdinto; li sciis tion kaj li kaŝis tiom da informo pri la afero ĉar la murdinto estis li mem.

Ho! Nu, la aŭtoro efektive ne diris, ĝuste *kiu* efektive kulpas. Ĉu la murdinto povus esti ... *Ŝibolet mem?!*

Ĉiuokaze Erik donis saĝan konsilon por s-ino Miozoto: “Mi sugestas, ke ŝi pli zorgeme elektu siajn kunmanĝontojn.”

Gratulon al Rafa kaj Erik pro iliaj spiritaj solvoj. Ili ambaŭ ricevos po \$5-rabaton de la retbutiko – do, laŭ la nuna amasvendado de libroj kontraŭ nur \$3, ili gajnis po 1.67 librojn!

New Tools for Communication

de la prezidanto • Filipino DORCAS

To strengthen our communication infrastructure and improve our relations with our members, the Board of Directors of Esperanto-USA is launching a new series of webinars and AMA sessions.

Webinars

The webinar is an online session in which one or more leaders present a topic. Then the members of the audience can ask questions about that topic. Sometimes the leader will set up a question for which the participants can vote. Webinars are up to one hour long and are informational about what is taking place in Esperanto-USA.

We are now working on many plans, projects, and initiatives. We will give information about the work as effectively as possible to our membership. As always, our main and official organ to inform our membership is this newsletter, *Usona Esperantisto*. The webinar is another information tool that supports and broadens the information in *Usona Esperantisto*. However, the main information platform remains *Usona Esperantisto*.

The next webinar will be about our annual report (*La Jarraporto*), which reflects our challenges, plans, current tasks, etc. You will learn what we are doing. You can ask questions during the webinar.

To prepare yourself for this next webinar, please read the annual report of Esperanto-USA (“Jarraporto”). It will be found under *About us* → *Documents* on our website.

AMA — “Ask Me Anything”

The AMA is a text communication tool. A leader can present material, but the main idea is to respond to questions. Participants have the right to enter questions during the hour or even beforehand once the session has been announced. The questions can be anything! The leader can begin with an explanation of a subject, but the questions can be related to other topics.

There is a great difference between the webinar and an AMA. A webinar is a live session with a camera and a microphone. It’s a defined theme. An AMA is a text system. Questions and answers are typed, but the participants’ questions are about anything.

Times for these sessions:

- 7:00 pm (Central time zone)
- 8:00 pm (Eastern time zone)
- 5:00 pm (Pacific time zone)

All take place on Thursdays:

- Sep 13, 2018: Webinar, pri la Jarraporto de Esperanto-USA. La sesio okazos en Esperanto.
- Sep 20, 2018: AMA
- Sep 27, 2018: Webinar
- Oct 11, 2018: Webinar
- Oct 25, 2018: AMA

Onward and Upward!



Novaj komunikiloj

Por klopodi fortigi nian komunikadan infrastrukturon kaj plibonigi niajn rilatojn kun nia membraro, la estraro de Esperanto-USA lanĉas novan serion de retseminarioj kaj respondsesioj.

Retseminarioj

La retseminario estas interreta kunsido per kiu iu (aŭ iuj) gvidas kaj prezentas temon. Poste, la spektantoj rajtas starigi demandojn. Kelkfoje tiu, kiu prezidas, starigas demandojn por kiu la spektantoj povas voĉdoni. Ankaŭ okazas periodo por demandoj, kiuj temas pri la materialo, kiun la gvidanto prezentis. La retseminarioj daŭras ĝis unu horo longe kaj estas informplenaj pri tio, kio okazis, okazas, kaj okazos en Esperanto-USA.

Ni nun prilaboras multajn planojn, projektojn, kaj iniciatojn. Ni donos informon pri ĉi tiuj elpaŝoj kiel eble plej efike al nia membraro. Kompreneble, nia

ĉefa kaj oficiala organo por informi nian membraron estas ĉi tiu bulteno, *Usona Esperantisto*. La retseminario estas alia informilo, kiu subtenas kaj ampleksigas la informon en *Usona Esperantisto*. La ĉefa informplatformo restas *Usona Esperantisto*.

La venonta retseminario temos pri nia jarraporto, kiu raportas niajn defiojn, planojn, aktualajn taskojn, ktp. Vi lernos pri tio, kion ni faras. Vi rajtos starigi demandojn en la retseminario.

Por prepari vin por ĉi tiu retseminario, bonvolu legi la Jarraporton de Esperanto-USA. Ĝi troviĝos sub *Pri ni* → *Dokumentoj* en nia retpaĝaro.

Respondsesioj

La respondsesio (angle “AMA”) estas teksta komunikado pri iu, kiu povas prezenti materialon, sed ĉefe respondas al la demandoj. La partoprenantoj rajtas entajpi demandojn dum la horo aŭ eĉ antaŭe, post kiam la sesio estas anoncita. Tiuj demandoj povas temi pri io ajn! La gvidanto povas komenci la sesion per klarigo pri temo, sed la demandoj rajtas temi pri aliaj temoj.

Estas granda diferenco inter la retseminario kaj respondsesio. Retseminario temas pri viva kunsido

kun kamerao kaj mikrofono. Temas pri difinita temo. Respondsesio okazas per tajpado, sed la demandoj de la partoprenantoj temas pri io ajn.

Horoj por la venontaj sesioj:

- 7:00 ptm (centra horzono)
- 8:00 ptm (orienta horzono)
- 5:00 ptm (pacifika horzono)

Ĉiuj okazos jaŭde:

- Sep 13, 2018: Retseminario pri la Jarraporto de Esperanto-USA.
- Sep 20, 2018: Respondsesio
- Sep 27, 2018: Retseminario
- Oct 11, 2018: Retseminario
- Oct 25, 2018: Respondsesio

Ek kaj antaŭen!



Filipo DORCAS

Filipo estas prezidanto de Esperanto-USA. Li kaj lia edzino Elizabeto loĝas en Fort Worth, Teksaso.

filipo@grupoj.org

Acha

senintenca esperantaĵo • Zerbie HYNSON



Dankon al membro Zerbie HYNSON de Syracuse, Novjorkio, kiu atentigis nin pri la jena emblemo. Ĉu glaciĥokeo vere kaŭzas tiel malagrablan impreson?

De la estraro

En ĉiu numero de *UE* ni petas al la estraranoj iomete raporti pri lastatempaj agadoj. Ni bezonas ankaŭ vian partoprenon, do bonvolu sendi al la redakcio viajn demandojn, proponojn aŭ eĉ plendojn por ili, ĉu en Esperanto aŭ la angla, laŭ via prefero. La redakciaj adresoj troviĝas en la kolofono.

Charlotte BURTON, Direktoro

Kiaj monatoj! Dum Julio, mi ĉeestis NASK-on (mian unuan!) ĉe Raleigh kaj la Landan Kongreson ĉe Seatlo. Ambaŭ estis rekorde grandaj laŭ la memoro de multaj partoprenantoj. Ĉe NASK estis 74 partoprenantoj, kaj ĉe la LK estis 100. Mi ĝuis sperti du tutajn semajnojn en Esperantujo kaj, kiel ĉiam okazas en Esperantujo, mi trovis multe da novaj amikoj kaj lernis multe. Mi apenaŭ povas atendi ĝis la venonta jaro por eĉ pli da tempo kun tiaj karaj samideanoj, sed dumtempe ni konversacias rete kaj planas grandajn planojn.

La nova estraro de Esperanto-USA jam laboras multe por vi. Ni laboras kaj diskutas kiel pli bone aŭskulti vin kaj kiel pli bone servi vin. Ni nun havas rajtprotektanton, kiu aŭskultos vin kaj parolos al la estraro pri viaj zorgoj kaj dankoj. Plue, mi nun estas estrarano de AAIE kaj esperas labori multe ankaŭ pri tio.

— Charlotte BURTON

Ben SPEAKMON, Vicprezidanto

Okazis la 66-a Landa Kongreso de E-USA en Seatlo, Vaŝingtonio, de la 13-a de Julio ĝis la 16-a, ĉe Seattle Pacific University; ĉi-jare tiu estis ankaŭ Komuna Kongreso kun KEA. 104 geamikoj aliĝis, kaj fine 100 ĉeestis – inter ili 36 komencantoj – por tre diversa kaj interesa programo. Ĉi-jare ni prelegis pri interlingvistiko, rondtablumis pri malkoloniigo,



spektis filmojn kaj ekskursis tra la bela urbo Seatlo.

Ni estis tre feliĉaj bonvenigi s-ron Chuck SMITH, iniciatinton de Amikumu, kiu paroladis laŭ la kongresa temo, *Konstruado kaj ĝuado de Esperanto-komunumo*. Li prelegis ankaŭ angle ĉe publika evento *A Taste Of Esperanto Culture*, ĉe kiu interesatoj povis eklerni pri nia historio, kulturo, muziko, kaj eĉ YouTube-kanaloj.

Estis nia plezuro gastigi ankaŭ profesoron d-ron Federico GOBBO, interlingviston kaj ordinaran profesoron de katedro Interlingvistiko kaj Esperanto ĉe Universitato de Amsterdamo. Li prezentis spertan kaj vervan prelegon pri siaj fakoj kaj energie kontribuis al la bonega etoso.

Aldone al la tradicia bankedo, ĉe kiu d-ro Gobbo denove bele rakontis laŭ nia temo al ni, okazis nekredible mirinda koncerto ĉe la koncertejo *The Vera Project, Seattle Center*, kie ludis por ni la fama bando La Perdita Generacio (kaj antaŭ ili lokaj muzikistoj: Alena ADLER, Simmon Keith BARNEY, kaj Nikvo WOODS). Ni dubas, ĉu iam ajn pli bela esperantaĵo okazis en Usono.

Dum la solena fermo de la kongreso, la LKK ĝoje (kaj kun iom da malŝarĝo) transdonis la standardon al BRUEGo, la esperantistoj de Bostono, kune kun niaj plej elkoraj bondeziroj por ilia sukceso venontjare ĉe la 67-a Landa Kongreso.

— Ben SPEAKMON

Jordon KALILICH, Direktoro

Komence, mi volas danki vin pro via subteno dum la ĉi-jara balotado. Kiel dirite, mi klopodos, ke Esperanto-USA pli bone propagandu Esperanton kaj servu vin. Por tiuj celoj mi havas multajn ideojn, kiujn la cetera estraro jam konsideras.

Post la LK mi feriiis, ĉeestante kaj UK kaj IJK. Ĉe IJK



mi ekhavis alian postenon: mi estis nomumita Komitatano A de USEJ (la junulara sekcio de Esperanto-USA) en TEJO. Se vi estas junulo, mi estos via junula voĉo en la internacia movado.

Ĉu vi havas demandojn aŭ sugestojn por E-USA aŭ USEJ? Mi volas aŭskulti vin, do ne hezitu skribi al mi ĉe jordon@kalilich.com.

— Jordon KALILICH

La timanta riĉulo

enigmoj • Daĉjo RUTAN

Dum ferio en la marborda urbo Haveno, Profesoro Ŝibolet respondis al urĝa frumatena telefonvoko de Petro PETOLA, juna riĉulo. Ŝibolet alvenis ĉe lia luksa tegmentapartamento precize unu minuton antaŭ la sepa matene.



En la koridoro Ŝibolet renkontis altan brunharulinon; ankaŭ ŝi atendis ĉe la pordo. Post momento la pordo malfermiĝis, kaj Petro invitis lin eniri.

La virino sekvis Ŝiboleton en la apartamenton.

Petro estis vestita per piĝamo striita verde kaj blue, sub velura ĉambra robo. Li salutis Ŝiboleton kaj suspekto rigardis al la virino.

“Sinjoro Petola”, ŝi diris, “Mi estas Roza FERANT. La agentejo sendis min.”

“Ho jes, la nova servistino”, diris Petro amike. “La kuirejo estas laŭ la koridoro tie. Mi estis baldaŭ manĝonta. Ĉu vi bonvole preparos ion por mi?”

La virino forpaŝis obeeme. Petro kondukis Ŝiboleton en la salonon, zorge fermis la pordon, kaj ili ambaŭ sidiĝis en luksajn brakseĝojn.

“Via voko estis iom urĝa”, Ŝibolet diris. “Bonvolu diri al mi la aferon.”

“Mi dankas vin pro tio, ke vi venis. Mi timas pri mia vivo.”

“Via onklo menciis al mi, ĉe nia monata vespermanĝo, ke vi konsentis atesti pri bankorabo.”

“Jes, vere. Unu el la krimuloj mortpafis kasiston. Efektive, estis kelkaj homoj en la banko, sed nur mi klare vidis la vizaĝon de la pafinto. Mi timas, ke iu provos malhelpi min atesti antaŭ kortumo venontsemajne.” Petro ekrigardis la grandan fenestron, tra kiu la supreniranta suno estis videbla. “Mi timas tiom multe, ke mi dormas dum la tago kaj eliras nur nokte!”

“Eble ni parolu kun Inspektisto Umilet ĉe la policejo”, proponis Ŝibolet. “Li povas preni vin sub sian protekton.”

“Tio estas bona ideo”, diris Petola en laca voĉo. “Sed ne ĉi-matene. Mi nun iras liten.”

Ĝuste tiam Roza frapis ĉe la pordo kaj eniris kun arĝenta pleto. “Mi preparis manĝeton por vi, Sinjoro Petola”, ŝi diris.

“Tio aspektas en ordo”, li diris, rigardante glason da vino, ŝinkosandviĉon, kaj pecon de ĉokolada kuko. Li prenis la vinon.

Ŝibolet subite ekspiris kaj kriis, “Ne trinku tion!” Li tuj ekstaris kaj kaptis la brakon de la nova servistino antaŭ ol ŝi povis forkuri. “Voku la policon!”

Kio alarmis Ŝiboleton, kaj kial? Se vi scias, bonvolu sendi **nur unu** solvon al redakcio (adresojn trovi en la kolofono) **antaŭ la 15-a de Oktobro**. Inter la solvintoj ni lotumos du \$5-rabatojn de la retbutiko.

First experiences at NASK

loke • Sandra BIRD



Participants in NASK-2018. Photo by Marcus Griep.

On my 65th birthday, I listened to the new **Freakonomics podcast** <<https://bit.ly/2yEOMaJ>> at the gym. It was about Esperanto, the Esperanto community, and why people learn the language. The description of the “curiously idealistic and pragmatic” world of Esperanto struck a chord with me since I would apply those descriptors to myself. I had just signed up for Medicare and I was in the middle of a year where I was dealing with three separate joint replacement surgeries. I was feeling the physical limits of my body and pessimistic about the long term prospects in pursuing my favorite dog sports. Like many friends in my age group, I feared the prospect of mental deterioration even more than the physical deterioration my body was experiencing. Learning a foreign language seemed like a great activity for my brain. The Freakonomics podcast released on my 65th birthday was a sign. So I enrolled in the Esperanto course on Duolingo.

I worked my way through the Duolingo tree and continued on with the strengthening exercises, and did some work with books, Lernu, YouTube etc. Duolingo provided a reasonable introduction to Esperanto but I was starting to feel stuck and decided to sign up and go to NASK. When I found out there was a true beginners course, I convinced my husband to come also.

Since my husband was in the beginner group and I wanted Esperanto to become a family activity, choosing the same class felt like the best way to achieve that goal. David was not convinced. Because I had spent a lot of time already struggling with Esperanto, he thought that I would benefit more from the intermediate class. At the social the evening

before classes started, I talked to a couple of other students who, like me, had been through the Duolingo tree, and they were in the intermediate class. They were young and bilingual. While I had finished the Duolingo tree, I felt stymied by the listening exercises and was saddened by how much I didn't know going back through the review and strengthening activities. Listening to the students talk about how long it took them to go through the Duolingo tree and complaining about how repetitive it was, solidified for me the decision to go into the beginner group.

It was a great decision. The class was a mix of people who had done pre-course work and were more facile with Esperanto than I was, and others who were total beginners. My husband and I both felt comfortable in the mix. We grew very fond of our fellow classmates. Our instructor, Tomaso Alexander, was great and did an excellent job switching between Esperanto-only times and English-explanation times. I don't think my linguistically untrained ear, my need for repetition, and my need to relearn basic grammar concepts in any language would have been a good match for the immersion style of the intermediate group. I made a lot of progress and had a lot of fun by staying in the beginner class.



Students chatting outside the cafeteria after the morning courses. Photo by Marcus Griep.


My biggest breakthrough was mastering the table of correlatives. I had worked on it previously, but the suffixes, the prefixes, and the conceptual map felt elusive. I had a good grasp of a few of the question

words before the class, but others kept slipping away. The work in class solidified the rest and then I was able to start confidently combining them with the other prefixes and understanding the other terms. The non-tabular discussion of the correlatives we did in class was very helpful. After waking up in the night to think about it, and more discussion in class the next day, I think I even understand which of the correlatives can be an object or a plural and why others cannot.

